

SUDFRANCIA STELO

Bulteno de la Esperanto-Federacio "LANGUEDOC-ROUSSILLON"

Jarabono : 20F al Fédération d'Esperanto du Languedoc-Roussillon
CCP 956-28 P Montpellier

3a Kvaronjaro 1985

n°94

SENSIGNIFAJ ANEKDOTOJ

Iun matenon dum la lastaj somerferioj, oni sonorigis insisteme je frua horo (la oka estas frua por ferianto). Je la pordo staris du ĝendarmoj kun barbulo. Mi tuj komprenis, ke oni bezonas mian helpon por interpretado. Tiel okazas de tempo al tempo, kiam eksterlandano, ne scianta la francan, havas problemon kun policistoj pro akcidento aŭ paneo...

La ĝendarmoj asertis, ke la akompananto posedas la anglan sed baldaŭ evidentiĝis, ke nur lia edzino iomete parolis la anglan sed ŝi forestis. Li mem, Nederlando, parolis la germanan lingvon kun tre speciala akcento. Kiu pretendis, ke ĉie oni parolas la anglan? Eble ĝendarmoj opinias, ke ĉiuj eksterlandanoj parolas la anglan... aŭ ke se oni komprenas la anglan, oni komprenas pli malpli la aliajn lingvojn...

La antaŭan tagon, nia nederlandano estis malsuprenirinta vojeton al rivereto kun loĝkamiono sed la bordo defalis kaj li retrovis sin kun la tuta familio en danĝera ekvilibro.

La fajrobrigadanoj malgraŭ peniga strebado estis senpovaj, garaĝisto ne sufiĉe ekipata; forstisto solvis la problemon sen damaĝo.

Nia feliĉigata barbulo tuj proponis monon donace sed la ĝendarmoj rifuzis, pro la publiko. La sekvantan matenon, ili vekis lin frue, timante, ke li foriros diskrete kaj postulis, ke li pagu iun sumon pro la servoj... Li promesis sendi monon el Nederlando sed la ĝendarmoj ne komprenis kaj lin veturigis al mia domo, por ke ni solvu rapide la aferon...

Montriĝis, ke li estas posedanto de pluraj pan-vendejoj en Roterdamo. Tiam la ĝendarmoj redonis lian pasporton!... Li ankaŭ klarigis, ke li preferas konservi monon por la rehejmiĝo. Tamen por eviti diskutadaĉon, li "donacis" trinkmonon por la fajrobrigado kaj la garaĝisto kaj la forstisto. Kio okazintus sen interpretado? Ĉu eksterlandanoj estas malfidindaj?

Kelkajn semajnojn poste, ni kampadis en iu ŝatata parto de Bavario. Estas strange, kiel en iuj kampadejoj, la francoj amasiĝas kaj tute forestas en aliaj. Ne estis aliaj francoj en tiu loko. La muntado de nia faldebla ruldomo kiel kutime allogis spektantojn. Aŭdiĝis pli malpli favoraj komentoj pri la francoj...

La sekvantan matenon niaj najbaroj ignoris nin, sed kiam ni salutis ilin en la germana lingvo kaj provis iom diskuti, la mienoj komplete ŝanĝiĝis. Ni ne plu estis strangaj eksterlandanoj (ĉu hazardo, ke la du vortoj similas en la franca?) sed afablaj vizitantoj...

Septembro. La lernejestro informas min, ke la horaro pri la angla lingvo iom reduktiĝis. Tamen la Ministro pri Edukado, dum la ferioj, asertis en belga gazeto, ke li faros ĉion necesan, por ke niaj gejunuloj regu du lingvojn... La celo pli kaj pli malproksimiĝas. Kolegoj min sciigas, ke pro la enkonduko de la regionaj lingvoj kaj la preskaŭ ĝenerala elekto de la angla kiel unua lingvo, kursoj de aliaj lingvoj malaperos...

Unua tago en la lernejo : la ĝelernantoj fiere portas vestojn kun surskriboj en la angla -kelkfoje kun evidentaj gramatikaj eraroj. Eble tio ŝajnigas, ke ili posedas la lingvon...

J.Hénin.

LA MINISTRO RESPONDIS...

...kaj lian respondon vi povos legi sur la paĝo 9a. Viajn rimarkojn ni aperigos en la venonta bulteno. Malaperis la argumento, ke E° ne havas kulturon sed aperis alia : gepatroj kaj gelernantoj ne favorus la enkondukon de E°...

* * *

Tiu bulteno certe memorigos vin pri la ferioj, kiujn bela vetero plilongigis. Tamen la grupoj pretas por nova laborjaro. Kunlaboru por sukcesigi niajn aranĝojn !

* * *

Nia federacio estis bone reprezentata en Augsburg, de 10 personoj, inter kiuj pluraj gejunuloj. Laŭdire dum tiu kongreso, jam 800 esperantistoj estis aliĝintaj al la Pekina kongreso. Pluraj federacianoj jam indikis sian deziron ĝin partopreni. En Novembro la Centro de Paderborn fiksis siajn prezojn. La komuna trajto de ĝiaj diversaj vojaĝoj al Ĉinio estas renkonto kun ĉinaj E° grupoj. Petu detalojn de JH.

* * *

Ni esperis okazigon de la Universala Kongreso en Parizo en 89 sed Brighton (G-B), kiu provizis senpagajn salonojn, estas elektita. Aŭstralio rezignis pri 88, anstataŭe oni organizos la UK en Nederlando.

* * *

Pli proksime de ni, la Sat-Kongreso de 86 okazos en Katalunio (Barcelono). Eble la UFE-kongreso de la Jubileo disvolviĝos en Provenco (St Aygulf).

* * *

Antaŭ nelonge R. Triolle estis elektita prezidanto de UFE kaj C. Nourmont sekretario. J-L. Texier restas estrarano. Plurjara programo estas sur la reloj.

* * *

Nia federacio decidis helpi la gejunulojn laŭeble. Jefe -kunlabore kun aliaj junul-asocioj - provas sin strukturi. Gravas tiu provo...por la estonteco. Tro ofte perdi-ĝas tiuj gejunuloj, ĉefe pro izoliteco. Indiku la nomojn de viaj gelernantoj kaj ni provos organizi apartan renkonton por ili, okaze de nia semajnfina staĝo. Ni ne perdu tiun okazon ! Junulo estas persono inter la aĝoj de dektri kaj tridek jaroj !

* * *

Guste la gejunuloj petas nian helpon. Eble vi jam aŭdis pri "Pasporta Servo". Ĝi estas famkonata ĉar la "Guide du Routard" (gvidilo de la petveturanto) mencias ĝin. Ĝi konsistas el pluraj centoj da esperantistoj en kvindeko da landoj, kiuj pretas senpage gastigi gejunulojn, kun rezervo pri anticipa interkonsento per letero aŭ telefono. La nombro de la gastigantoj iom malkreskis en 86, en nia regiono troviĝas nur unu adresoj ! Vi mem fiksis la kondiĉojn de akcepto, do neniu plendos. Kaj se vi ne certas pri disponebleco, vi povas simple esti "loka peranto". Gejunuloj bezonas vian helpon, kuraĝigu ilin ! Vian adreson sendu antaŭ la 15a de novembro al Daniel Reynaud 6, Rue de la Haute Croix 45800 St Jean de Braye. Antaŭdankon !

* * *

Kadre de la Jubileo aperis libro de J. Amoureux pri la historio de la movado en Rusiljono. Evidente tiu historio estas ligita al la federacia, nacia kaj internacia historioj. Legado de tiu belaspekta libro estas instruplena. Rezervigu vian ekzempleron je la libroservo (45F) ĉar la eldonkvanto estas limigita. Du aliaj libroj estas planataj de federacianoj por 1987. La sekreton ni malkaŝos ĝustatempe !

* * *

Pro mankospaco ne aperas franclingva paĝo kun argumentoj. Venontfoje vi legos paĝon pri la angla lingvo kiel internacia komunikilo. Vi povas kompreneble kontribui !

* * *

AŬTUNA FEDERACIA KOMITATKUNVENO:

(dimanĉon, la 22an de Septembro 85 en Sète)

Ĉeestas 8 el la 15 federaciaj komitatanoj. Senkulpigis S-ino Négron kaj S-ro Borque. Je la 10a h. JH malfermas la kunvenon per salutvortoj al la ĉeestantoj kaj, aparte, al S-ro Tyblewski el Pollando, aŭtoro de pluraj libroj en E° kaj al S-ino Marin el Parizo. Li gratulas la grupon de Nîmes, kiun reprezentas S-ino Soulier, pro la bona disvolviĝo de la federacia kongreso.

Pri la lingvostaĝo en Valras raportas S-ino Authier. Venontjare samtipa staĝo okazos en la oportuna "Château de Cassan". Eble gejunuloj povus sin renkonti samloke kaj samdate. La grupo de Béziers findecidos pri la afero.

Pri la finiĝanta E°-semajno en Sète raportas Y. Vierne. Partoprenis 40 homoj inter kiuj eksterlandanoj. Alterne kun Sète, venontjare la "semajno" (30a de Aŭgusto-6a de Septembro 1986) okazos en Thonon les Bains. S-ro Tyblewski kaj S-ino Marin tre favore parolis pri la travivita semajno.

Per 6 voĉoj kontraŭ 2 ni decidis refoje skribi al S-ro Chevènement por rebati lian rifuzon koncerne la instruon de esperanto. Nia venonta federacia kongreso okazos en Hérault fine de Aprilo. Y.V. sugestas La Grande Motte. Koncerne la plurjaran programon de UFE, ni komisiis JH por reprezenti nian federacion okaze de la venontsemajna ĝenerala kunveno en Parizo. Ni jam pridiskutis la efikon de la noveldonitaj poŝtkartoj de UFE. Pri ĝi ni iel dubas. Estas proponate eldoni "argumentatajn" poŝtkartojn far la federacio. JH atentigas pri

-eldono de adresaro far Info-Servo en Germanio;

-starigo de migranta E-lernejo planita de francdevena esperantisto, Roger Imbert, nun loĝanta en Jugoslavio. Pri tio ni legu en "Franca Esperantisto" n°362, p.87. Sian novan profesiulan agadon li intencas komenci en Lozère kaj sur nia federa-

-cia teritorio.

Pri SFS, la abonkosto estos 20F en 1986. JH alvokas al ĉies helpo kaj kontribuoj. Pro abundaj taskoj, li petas la komitaton pripensi lian anstataŭigon kiel federacian prezidanton, por bone prepari la Jubileon.

Kontentigaj rezultoj de la grupo de Montpellier, kadre de la "Foiro de la Asocioj". Sugeste de R. Laval la federacio abonos la bultenon de la "Office régional de la Culture", tiel ke nia voĉo ankaŭ aŭdiĝu.

Jefo deziras pli strukturiĝi kaj dinamikiĝi. Pro tio Izabela, filino de JH, atendas enskribiĝon de gejunuloj por provi ion fari kune. Nia federacio helpos laŭeble. La kunveno finiĝis je la 12a h.

Protokolis: Jean Amouroux.

RECENZO

Histoire du Mouvement espérantiste en Roussillon.

Tiu belprezenta broŝuro estas ne dika, sed densa. Abunde kaj precize dokumentita. Nia amiko Jean Amouroux, helpate de geamikoj Lloancy, plenumis benediktanan taskon, esplorante kaj analizante amason da arkivoj, el kiu li ĉerpis veran historian sintezon.

Per ĝi oni vidas, ke Rusiljono estas verŝajne la unua parto de nia regiono, en kiu ĝermis la movado en la komenco de la nuna jarcento, kiam ankoraŭ vivis la Majstro kaj liaj unuaj disĉiploj. La unua ĝermo estis alportita en Perpinjanon de rektoro Boirac, fama pioniro de la "franca periodo", kiu persone konis Zamenhof, kaj pri kiu ni ekscias, ke li ofte restadis en Rusiljono, kie vivis parencoj de lia edzino. Per parolado de li en 1902 multaj Rusiljonanoj unuafoje aŭdis pri la lingvo internacia, kaj pluraj el ili entuziasme varbiĝis.

Inter ili J. Amouroux havis la surprizon eltrovi la nomon de lia patrino avo. Ni povas imagi lian ĝojan emocion ĉe tiu eltrovo. Tiu avo, metiisto (frizisto), estis ankaŭ pioniro en la sindikata kaj laborista agado, kaj apartenis al la unua generacio de la laboristaj esperantistoj. Jam en tiu frua periodo naskiĝis "Paco Libereco" (1906), kiu poste fariĝis "Liberiga Stelo", embrio de la estonta "Fédération espérantiste ouvrière" (1910) en kiu fine aktivis la fondontoj de SAT kaj SAT-amikaro.

daŭrigo sur p. 9:

BEZIERS: Dum la someraj monatoj, ne multo okazis. Tamen, printempe, kelkaj vizitis en Anglujo la grupon de Stockport, la ĝemela urbo. Ni atendas niajn anglajn amikojn en la printempo.

MONTPELLIER: Foiro de la Asocioj, la 15an de Septembro.

La grupo de Montpellier denove partoprenis tiun gravan eventon sur la fama promenejo "Le Peyrou". Nia budo, ses metrojn longa, prezentis librojn, revuojn kaj dokumentojn sur paneloj, kiuj rilatis al la lingvo, la movado kaj la kursoj.

Ni disdonis ĉirkaŭ 500 flugfoliojn al la multnombraj interesitoj. Inter ili ĉirkaŭ 30 mem enskribiĝis sur kajero por ricevi informojn pri la kursoj. Entute kontentiga tago por diskonigi nian lingvon.

PERPIGNAN: Esperantista pikniko.

La dekkan de aŭgusto okazis en la vilao de S-ro R. Llech-Walter en Argelès-sur-mer la tradicia pikniko. Oni havis la plezuron akcepti S-inon Marie-Thérèse Lloancy el Pau, kiu antaŭ nelonge prezentis kun granda sukceso tezon pri Raymond Schwartz.

Post la banado ĉiuj manĝis kun bona apetito kaj posttagmeze S-ino M. Gouges kantis en esperanto. S-roj Tusell kaj Tonon brile ludis mandolinon kaj gitaron.

S-ro J. Amouroux, kiu eldonis libron pri la Esperantista vivo en Perpignan de 1914 ĝis nun, S-ro C. Boumal, belga samideano, S-ino A. Csupor, de rumana deveno, S-ro J. Fernandez, inter aliaj, ĉeestis tiun piknikon.

Dupaĝa artikolo de S-ro Abecassis aperis en la bulteno de la israelida komunumo de Perpignan kun la titolo: "Lingvo sen limoj, Esperanto en la lernejoj, kial ne?".

LA CANOURGUE: Okaze de kunveno pri la Homaj rajtoj, kun partopreno de la fama argentina pianisto Miguel Angel Estrella, intervenis J. Hénin koncerne la rajton je komunikado kaj S-ro Tyblewski, kiu tre oportune troviĝis tie je tiu dato, pri la nuna stato en Pollando. Okazis ankaŭ ekspozicio kun budeto pri esperanto. "Mende Radio" ankaŭ intervjuis nin dum kvaronhoro pri esperanto kaj Pollando.

MONTO LOZERE: Komence de Julio disvolviĝis tie piedmigrado. Partoprenis 13 personoj, inter ili 6 geesperantistoj (inter kiuj 2 Italinoj). En 1986 tiu semajno okazos en la Alpoj, apud Trescléoux.

VIZITINTOJ: El Pollando, unue T. Tyblewski vizitis la grupojn de la federacio post la semajno de Sète kaj gvidis psikologiajn ludojn; poste venis S-ino Roszak, kiu montris lumbildojn pri la teks-arto.



Nova aventuro de Tinĉjo:

LA SEKRETO DE L'UNUKORNULO ... povas aperi se rapide finvendiĝas la 2000 ekzempleroj de LA KRABO KUN ORAJ PINCILOJ, kiuj ankoraŭ kuŝas ĉe la eldonisto post 4 jaroj... Rezervu unu aŭ plurajn ekzemplerojn de "La Krabo..." (prezo: 32F) je la federacia libroservo kaj tiel vi helpos al la eldonado de nova albumo. Donacu "La krabo..." okaze de la jarfinaj festoj. Antaŭdankon!

Ministère
de l'Éducation Nationale

Paris, le 26 JUIL. 1985

Le Ministre

CAB/BDC/CP/N° 4763 M
V/Lettre du 30.5.1985
RÉF : RS/LMG/7697/26600

Madame le Député,


Je vous remercie de m'avoir communiqué le texte préparé par la Fédération du Languedoc-Roussillon pour l'espéranto. Je l'ai examiné avec attention.

Je comprends l'ardeur que mettent des militants à défendre une langue internationale qu'ils estiment susceptible de contribuer à l'amélioration de la compréhension entre les nations. Je comprends leur objectif.

Il n'est pas possible en revanche d'envisager que l'espéranto se substitue aux langues nationales étudiées en classe. Les parents et les élèves ne l'accepteraient pas ; nos partenaires étrangers non plus.

Il me paraît plus raisonnable et plus réaliste pour les associations de poursuivre l'action qu'elles mènent fréquemment et particulièrement à l'occasion des activités des foyers socio-éducatifs des établissements de façon à faire progressivement ressortir l'intérêt que représente l'espéranto pour la communication internationale.

Je vous prie d'agréer, Madame le Député, l'assurance de mes sentiments les meilleurs.



Jean-Pierre CHEVENEMENT

Al tiu letero de la Ministro ni respondis jene:

"Le Comité Directeur de la Fédération du Languedoc-Roussillon pour l'Espéranto, réuni à Sète le 22 Septembre 1985

-prend note de la réponse (26 Juillet 1985) qu'a faite M. Jean-Pierre Chevènement, Ministre de l'Éducation Nationale, par l'intermédiaire de Mme Renée Soum, Député des Pyrénées-Orientales, au texte approuvé lors du congrès fédéral de Nîmes les 4 et 5 Mai,

-réfute formellement l'ensemble du troisième paragraphe de cette réponse: l'enseignement de l'espéranto ne tend à supplanter celui d'aucune autre langue. Bien au contraire: ses qualités propédeutiques ne peuvent que faciliter leur apprentissage.

-préconise la mise sur pied d'une commission ministérielle paritaire comprenant parents d'élèves et espérantistes afin que la question de l'enseignement de l'espéranto soit abordée et résolue sur une base de faits vérifiables et non d'après des idées "a priori",

-demande qu'aboutisse enfin le texte réglementaire, dans l'esprit et le respect des signatures de la proposition de loi déposée par le Parti Socialiste lors des deux précédentes législatures".

kaj ni kunsendis fotokopion de la leĝproponoj, kie aperas la nomo de la Ministro mem...



KUNVENOJ & KURSOJ

MONTPELLIER: Kiel pasintan jaron, niaj kunvenoj okazos en "Maison pour tous Joseph Ricome, 7 Rue Pagès, je la 20 h 45.
Venontaj kunvenoj : merkredon, la 6an de Novembro : raportoj pri la Universala Kongreso en Augsburg, fare de 4 partoprenintoj kaj merkredon, la 3an de Decembro.

Kursoj: en CIJ (Centre International de la Jeunesse)
Impasse de la Petite Corraterie, ĉiun ĵaŭdon
de la 18a horo ĝis la 19h15

PERPIGNAN: Kursoj : ĉiun lundon, de la 18a ĝis 19a horo : konversacia kurso
ĉiun mardon, de la 16a ĝis 17ah kaj de la 17a ĝis 18a horo : meza kurso
ĉiun vendredon, de 18h30 ĝis 19h30 : Unuagrada kurso

BEZIERS: Pro diversaj kialoj, inter ili urbaj festoj, kristnaskaj arboj, ni festos la Zamenhof-tagon la 8an de Decembro. La grupo organizos lingvostaĝon de la 8a ĝis 11a de Majo 1986. Pliajn informojn kaj aliĝilon vi trovos en la venonta SFS. Sed, ekde nun, rezervu tiujn tagojn kaj ilin rezervigu fare de viaj gelernantoj.



NIMES: La kultura centro kunvenas ĉiulunde de la 16a ĝis la 19a en Centre Culturel Pablo Neruda, 2a etaĝo, 2a pordo : konversacia kunveno
-la 23an kaj 24an de Novembro, Palais des Congrès, Foiro de la Asocioj Partopreno de nia rondo.



-la 18an de Januaro 1986, de la 14a horo ĝis la 18a: REGOKUKO.
Prezento de filmo - Kostumbalo por infanoj. Partoprenokosto: 15 F.
Ĉeestontoj bonvolu sin anonci kaj sendi bankan aŭ poŝtan ĉekon al:
Cercle culturel espérantiste 213, Avenue de Camargue
30120 Caissargues Pŝk: 20 132 Montpellier (antaŭ la 1a de Jan.)

AVIGNON: Denove SFS aperas tro malfrue por reklami la 2an Rodanan E°-rendevuon de LF Koop (la 19an kaj 20an de Oktobro), kiun ni tamen anoncis lastfoje. Dimanĉon, la 15an de Decembro, okaze de la Zamenhofa tago, Pierre Janton prelegos pri la temo : "la interna ideo en 1985"



KATALUNIO: En Sant Cugat del Valles, apud Barcelono, okazos la 21a kataluna kongreso.

**21a KATALUNA KONGRESO DE ESPERANTO
SANT CUGAT DEL VALLES
1985.10.31 / 1985.11.03**

JAM NOTU POR 1986:

26an kaj 27an de Aprilo : Federacia Kongreso (en Hérault)
8a ĝis 11a de Majo : Semajnfina staĝo en Cassan apud Bédarieux
(detaloj en venonta SFS)
17a ĝis 19a de Majo: Nacia kongreso en Gérardmer
somero 86: UEA kongreso en Pekino; SAT kongreso en Barcelono,
TEJO kongreso en Israelo

La venontaj universalaj kongresoj okazos en Pekino (86), Varsovio (87), Nederlando (88) Brighton (89) kaj Afriko (Abidjan?) (90).

NE FORGESU PARTOPRENI

OKA INTERNACIA SEMAJNO ĈE MEDITERANEO

Alvenis 46 aliĝoj sed malaliĝis 6, do restis 40.

Inter la 40 partoprenintoj ĉeestis 5 eksterlandanoj el Usono, Germanio, Pollando, Japanio. Okazis 3 kursoj:


1 elementa, gvidata de Marcelle Turin el Pontarlier,

2 superaj : unu paroliga, gvidata de Tyburcjusz Tyblewski,

unu pli gramatika, gvidata de Jeanine Vincent el Bauge.

Tri partoprenintoj brile sukcesis la ateston pri elementa lernado.

Ni ĝuis belan veteron. La etoso estis ege agrabla. Ĉiuj estis kontentaj pri la kursoj, pri la strando, pri la manĝoj, la loĝejoj, la loko, ktp...



La ĝenerala kunveno de la partoprenintoj decidis, ke venontjare la semajno okazos en Alpoj, en Alta Savojo, je 17 km sude de Thonon, ĉe montpasejo de Cou, en alia familia feriejo. Ĝi okazos de sabato, la 30a de Aŭgusto ĝis la 6a de Septembro.

Kelkaj partoprenantoj malkovris, ke Esperanton oni povas en ne rutinaj situacioj uzi, ne nur por lingve perfektigi sed ankaŭ psike evolui. La spertoj en Sète probable lasis en ili ne forviŝeblajn spurojn.

Alia rimarko : de la komenco de la "Semajno" antaŭ 7 jaroj, la lingva nivelo de la ĉeestantoj plialtiĝis kaj malgraŭ la plimulto de francoj, ni malmulte krokodilis. Dankemon al Yvette Vierne, sen ŝia laboro kaj persistemo nenio estus .

IMPRESOJ DE UNUA UNIVERSALA KONGRESO :

Por la unua fojo, mi partoprenis Universalan Kongreson en kiu partoprenis pli ol 2000 Esperantistoj el multaj landoj. Tio kreis apartan kaj amikan etoson, kiu tre kuraĝigis min paroli Esperanton, kvankam mia parolkapablo ne estas ankoraŭ plena. Mi povis konstati, ke Esperanto tute bone funkcias. Ĉiam, ĉie oni babilis sen problemoj!

Escepte de kelkaj salonoj, kiuj estis tro malgrandaj por la multnombraj partoprenantoj kaj de kelkfoje malproksimaj loĝejoj, la organizado de la kongreso estis tre bona kaj la germanoj ĉiam afable informis kaj helpis la kongresanojn. Ili akceptis nin kiel verajn gastojn.


Inter la diversaj kunvenoj kaj prelegoj, mi vidis tre interesajn aferojn. Diversaj spektakloj kiel japana pupteatro kaj aliaj teatraĵoj albis multajn personojn.

Kaj en konkludo, dum la solena fermo de la kongreso, bona surprizo atendis la francajn Esperantistojn. La estraro de UEA atribuis la pokalon Fyne al UFE pro ĝia agado por Esperanto kaj ĉefe pro reordigo de ĝiaj instruaj metodoj kaj bona kunlaboro kun eksterlandaj organizaĵoj.

André Rocher.

Omāĝe al Pierre Delaire, kiu forpasis en Junio .

LA ETA PRINCO (A. de St Exupéry)



Tradukita de franco (P. Delaire), kompostita en Brazilo eldonita en Kanado,...

Jus reaperis tiu libro kun koloraj desegnoj de la aŭtoro Ĝi estas bona propagandilo por nia lingvo, ĉar ĝi konigas la francan literaturon ekstere. (85F)

"Kvankam principe verkita por infanoj, la humanista filozofio de "La eta Princo" antaŭ ĉio tuŝos la spiriton, sed precipe la koron de la bonanimaj plenkreskuloj, kiuj -inter aliaj aferoj- scias bone, kiom valoras amiko, kaj komprenas, ke malpravas la homoj, kiuj kredas sin la centro de la mondo"

LETERO EL FLORAKO

La montaro kiel la maro ŝanĝas sian koloron en ĉiu horo de la tago, kaj ankaŭ de la nokto, kiam lumas la luno. Ni sciu rigardi ĝin per ĉiam freŝaj okuloj.

Ĉiumatene je sunleviĝo, mi staras ĉe mia malfermita fenestro, kaj rigardas okcidenten al la dolomita klifo, kiu kronas la kaŭson*. Dum kelkaj minutoj la blankaj rokoj aspektas belege salmonrozaj.

Antaŭ 35 jaroj, en bela somertago, en alta Savojo, mi troviĝis en familia kaj amika rondo sur la Aravis-intermonto, fronte, oriente, al la Monto Blanka. Malantaŭ ni subiris la suno. Dum kvarono da horo, karesata de la lastaj radioj, la neĝkovrita masego de la Alpa giganto ricevis sekve kaj grade ĉiujn nuancojn de rozkoloro. Fine, en la preciza sekundo, kiam malaperis la suno, la rozkoloro per kontrasto subite ŝanĝiĝis al verdo. Neforgesebla spektaklo.

Aliajn mi memoras:

1912 : Sunleviĝo sur Tunizo kaj la Tuniza lago;

1924 : Sunleviĝo vidata de sur Aigoual-monto en Ceveno. En la pura aero, la frua sunlumo malkovris al ni oriente la Alpan montoĉenon, norde la suprojn de Aŭbrako kaj de Aŭvernjo, sude la Mediteranean marbordon. Kelkajn minutojn, ĝis leviĝanta nebulo dronis la tutan vastegan pejzaĝon;


1970 : Sunsubiro sur Partenono, alia sur Egea maro ĉe Sunion-kabo.

Kaj en diversaj jaroj, pluraj sunsubiroj sur Kamargo, kiam rozaj flamengoj flugas super la iriza ebena de Vaccarès-lageto. Kiu pentrista paletro estas tiel riĉa?

Iafoje sur la flankoj de kaŭsoj mi kolektas fosiliojn. Mi aparte admiras amonitojn, iliajn tre diversajn formojn, eĉ iliajn kolorojn, kiam temas pri piritoj. Venas en mia memoro la vorto de Alberto Godri** : "La Naturo, ĉiam bela kaj ĉiam bona, ŝajnas esti sin superinta en Ammonites". Vorto de scienculo kaj poeto. Bela kaj bona, la naturo?

Lan niaj homaj kaj humanaj kriterioj, ĝi ofte aspektas malbelega kaj kruelega en la senkompata lukto por ekzisto. Sed ni evitu la antropocentrismon. La naturo estas nek bela nek malbela, nek bona nek malbona. Ĝi indiferece liveras al ni siajn diversajn produktojn, inter ili kelkaj estas ja belaj por niaj homaj okuloj : al ni la plezura tasko ilin retrovi kaj ĝui.

Tiaj belaĵoj abundas en nia Langvedok-Rusiljono.



VALO.

* Kaŭso (Causse): kalkoŝtona ebenmonto

**Albert Gaudry : Les Enchaînements du monde animal dans les temps géologiques.

Natursciencaj historioj (2) : LA MUSO

Dum mi, en lampheleco, skribas mian ĉiutagan paĝon, mi aŭdas etan bruon.

Se mi haltas, ĝi ĉesas. Ĝi rekomenciĝas tuj kiam mi gratas la paperon.

Estas muso vekiga. Mi divenas ties iradon tien kaj reen, ĉe l'rando de obskura truo, kien mia servistino metas siajn viŝtukojn kaj brosojn. Ĝi saltas teren kaj trotas sur la kuirejkaheloj. Ĝi pasas apud la kameno, sub la lavujo, perdas sin meze de l'teleraro, kaj per serio da esploroj, kiujn ĝi riskas pli kaj pli lontane, ĝi pliproksimiĝas al mi.

Ĉiufoje kiam mi demetas la plumingon, ĉi silento maltrankviligas ĝin. Ĉiufoje kiam mi uzas ĝin, eble la besteto kredas, ke alia muso estas aliloke, kaj ĝi sereniĝas.

Poste mi ne plu vidas ĝin. Jen ĝi, sub mia tablo, inter miaj kruroj. Ĝi cirkulas de unu seĝpiedo al alia. Ĝi tuŝetas miajn lignoŝuojn, mordetas ties lignon aŭ, sentime, jen ĝi sursaltas.

Kaj mi devas ne movi la gambon, aŭ ne tro forte spiri : ĝi tuj forkurus! Sed necesas daŭrigi la skribadon, kaj, pro timo, ke ĝi forlasus min kun mia enuo de soleculo, mi skribas signojn, bagatelojn, ete, etege, samkiel ĝi ronĝetas...



daŭrigo de la recenzo de la paĝo 3.

Legante la broŝuron ni sekvas paŝon post paŝo la kreskadon de la esperanta afero, kun altoj kaj malaltoj, tra malfaciloj kaj obstakloj, tra fiaskoj kaj sukcesoj, sed "rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante", ĉiam celkonforme, kun "l'espero, l'obstino kaj la pacienco", en Rusiljono kaj en cetera Francio, en hispana Katalunio kaj en la tuta mondo. Vojirante ni renkontas nomojn de senfamaj batalantoj kaj de eminentaj personoj, de Boirac ĝis Ĉe kaj Lidja Zamenhof. Tiu libreto estas mino, el kiu ni povas ĉerpadi altvalorajn informojn, ofte novajn por ni. El ĝi fontas kuraĝigaj ekzemploj, instigoj al agemo, kaj utilaj materialoj por nia propagando. Resume tiu verko, frukto de amo, estas entute bona ago.

Valo.

LA LEGANTOJ SKRIBAS

En la n° 93, L. Angevin pledis por aperigo de adresaro. Je la federacia nivelo, tio estas malfacila pro la nombro da esperantistoj; pri internacia adresaro skribis S-ro Colney, el Gap.

...."kiel L. Angevin, mi opinias, ke fidinda kaj ĝusta adresaro estas tiel utila sur la praktika grundo kiel vortaro sur la lingva.... Sur la tutmonda tereno povas preni tiun iniciaton nur unuopulo sufiĉe entreprenema kaj riskema. La TEA (Tutmonda Esperantista Adresaro) aperinta en 1981 lasis gravan deficiton al nia amiko Welger. Tamen sub la instigado de pluraj amikoj, inter kiuj mi-mem, li konsentas denove eldoni freŝdatan adresaron, kiu verŝajne aperos komence de 1986. Nepre enskribiĝu kaj enskribigu gesamideanojn en kiel eble plej diversaj urboj kaj landoj... Mi povas dissendi tutpretajn kartojn antaŭ la fino de oktobro, lasta momento, al ĉiuj petintoj kontraŭ 2 poŝtmarkoj por 5 ekzempleroj, 3 p.m. por 15 ekz. Esperante, ke per la helpo de multaj ni povos trafe antaŭenigi nian aferon, mi plej kore salutas vin".

Info-servo, Bismarckstrasse 28, D 3550 Marburg jam enkomputiligis 14000 adresojn, el kiuj ĉirkaŭ duonon ili aperigos en la nova TEA. Oni povas jam mendi la adresaron, ĝi kostos inter 7 kaj 12 germanaj markoj (se la prezo superos 15 DM, oni ne eldonos la adresaron). Nur post ricevo de sufiĉe da antaŭmendoj, oni decidus pri la presigo. Por aperigo de via nomo indiku vian adreson (kaj nomon!), eventuale vian naskiĝ-jaron kaj profesion, hobiajn, la gradon de via E°-kono (elementa, meza, bona, tre bona), se vi serĉas korespondpartnerojn kaj se vi povas aŭ volas gastigi aliajn esperantis-tojn post skriba aŭ telefona interkonsento. Urgas la afero, skribu rapide!





"Sudfrancia stelo" estas informilo

sed ĝi estas ankaŭ nia ligilo.

Viaj kontribuoj kaj rimarkoj estos bonvenaj.


Sendu viajn leterojn al: Jean Hénin 48500 La Canourgue

"La Voix de l'Europe" H 50/3 391 Grand Mail Montpellier 34100 Tel 67 75 47 09 estas bulteneto, kiu aperas dekunu fojojn en la jaro, abono 80 F. Ĝi celas esti la ligilo de tiuj, kiuj agadas por la konstruo de Eŭropo. Sur la frontpaĝo, reproduktata ĉi-sube, oni ankaŭ aldonis la esprimon en E°: "Bonan tagon!".




Bonan Tagon (1)





10
U. J. K.



Biciklante al la **41-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO**
SCHLOSS ERINGERFELD
22-29.7.1985 F.R. GERMANIO

La 15an de Julio ni entrajniĝasal Thionville. La sekvantan matenon, ni retrovas (feliĉe!) niajn biciklojn en la stacidomo. La Aventuro komenciĝas !
 Post dudeko da kilometroj tra la franca kamparo, ni atingas la germanan landlimon. Ĉio iras glate, la doganistoj estas simpatiaj. Nun ni biciklas eksterlande !
 Ĉiutage post 60 ĝis 80 kilometroj ni atingas la junulargastejon, kie la akcepto estas ĉiam amika. Kelkaj vizitoj kompletigas nian vojaĝon. Post 6 tagoj da biciklado kaj proksimume 400 kilometroj, la celo proksimiĝas. Sep kilometrojn antaŭ la celo, kredo haltigas nin. Dank'al la helpo de senfulgigistoj, ni riparas. Fine ni alvenas!
 La unua kontakto kun esperantistoj okazas dum interkonatiĝa vespero. Ni ludas, dancas. Iuj esperantistoj, amikoj jam de longe sin retrovas. Ĉiu malkovras novajn amikojn. Dum la kongres-semajno ĉiu aktivigas. Ne mankas okupoj : sportoj, diskuttrondoj, manlaboro, kursoj... Je la fino de la kongreso oni konas sin reciproke. La semajno pasis rapide en agrabla etoso. Oni rendevuas : ĝis la venonta kongreso !
 Por ni la vojaĝo rekomenciĝas. Hazarde ni renkontas la biciklan karavanon sed niaj vojoj ne estas la samaj, ĉar ni rezervigis litojn en junulargastejoj. En Marburg akceptos nin esperantistino; ŝi vizitigos al ni sian urbon kaj gustumigos specialaĵojn. Alian fojon, hazarde, en Würzburg, ni renkontas germanan amikinson, kun kiu ni konatiĝis en la Junulara Kongreso !
 La etapoj ne estas tro longaj sed ni suferas pro la suno, ne pro la pluvo aŭ vento kiel ni timis...kaj ankaŭ pro la deklivoj !
 La vojaĝo finiĝas per trajno en Augsburg, kie ni retrovas multajn novajn amikojn. Nun ni estas riĉaj je rememoroj kaj pretaj por rekomenci !

Izabela kaj Brigita.

* * *

ANONCOJ


Radio Polonia (E° redakcio 00-950 Varsovio - Box 46 - Pollando)
 petas raportojn pri aŭskulto kaj rimarkojn pri la enhavo.
 Vi povas peti aŭskulto-raportilojn kaj mendilojn por "Koncerto kun bondeziroj".

* * *

Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo (IKEF)
 peranto : F-X. Gilbert - Vert Coteau - Longeville en Barrois -55000 Bar le Duc
 starigis la bazon de "peradservo", ebliganta kontaktojn inter tiuj, kiuj "proponas"
 kaj tiuj, kiuj "serĉas" varojn de ĉiu speco.

* * *

"Mil ŝercoj el tutmondo", libro en preparado, atendas kontribuaĵojn de "ŝercemuloj, spritemuloj, humuremuloj, ridemuloj kaj ridigemuloj, distremuloj kaj distrigemuloj... kaj ĉiuj aliaj skribemuloj, tradukemuloj, kompilemuloj, verkemuloj kaj kunlabore-muloj". Sendu ŝercojn -laŭ via gusto- el via lando antaŭ la 31a de Decembro 1985 al S-ro Slavko Šimunić - YU.41000 Zagreb ,Creska 18.



EI
 "Koncize"

TAMEN FIASKIS LA AFERO...

LANGUE INTERNATIONALE Popularisation de l'espéranto

En 1954, l'U.N.E.S.C.O. recommandait aux pays-membres d'encourager l'étude de la langue internationale espéranto. Depuis, celle-ci a connu un nouvel essor et elle est maintenant parlée par plusieurs millions de personnes et dans une centaine de pays.

Pourtant, sur les 183 villes de France où l'association universelle d'espéranto possède des «délégués-consuls», une seule se trouve en Lozère. C'est ce qui a incité M. Roger Imbert à choisir ce département pour y lancer une campagne de popularisation de la langue du Docteur Zamenhof. M. Imbert, qui a été collaborateur du service culturel international de Zagreb (Yougoslavie), tirant profit d'une étude effectuée par cette institution, promet aux Lozériens de les faire parler espéranto à quatre-vingt-quinze pour cent au bout de dix-huit heures d'étude. Ou plus exactement, de connaître alors 95 % des éléments de conversation courante, tels qu'ils ont été sélectionnés par un ordinateur. Dès la sixième leçon, les élèves des cours intensifs pourront correspondre avec l'étranger. Mieux encore, s'y rendre. Ils seront invités à suivre les six leçons suivantes en Yougoslavie, où ils seront les hôtes de leurs «camarades de classe» de Zagreb. Pour la troisième étape ils rendront à ceux-ci l'hospitalité en Lozère. Les élèves qui ne pourront pas être du voyage suivront un cours par correspondance ou un autre stage en Lozère.

Pour le moment, des cours intensifs d'espéranto sont prévus à Mende, Marvejols, Saint-Chély-d'Apcher, Florac, Sainte-Enimie, La Canourgue, Langogne et Villefort. Dès que nous en connaissons les lieux et dates exacts nous en informons nos lecteurs.

LA LANGUE INTERNATIONALE EN TROIS JOURS

— Cours d'initiation à Mende —
— Stages de week-end —
— Cours par correspondance —

Rens.: **R. IMBERT**
22, rue Pasteur — 89400 MIGENNES

18.20/89/15

LE BILLET LOZERIEN

Espéranto

Demain à 20 h, salle de la Chicanette, une conférence sur l'espéranto sera donnée par M. Roger Imbert, et pendant les trois soirées suivantes des cours de base seront donnés. L'espéranto, c'est l'espoir. C'est la création d'un homme Lejzer Ludwik Zamenhof qui a mis l'espoir de millions d'hommes dans une langue qui serait celle de tous les habitants de la planète. Lorsqu'on se comprend, on a les plus grandes chances de s'entendre! L'espéranto une langue qui de 16 règles et 917 racines est la plus facile des langues internationales. Elle exige seulement 150 à 200 heures de travail contre 1.500 à 2.000 pour les autres.

Elle est une question de logique plus que de mémoire. Nous croyons que même les détracteurs de l'esperanto admettent que le développement de cette langue faciliterait bien les contacts. Ceux et celles qui voyagent, ne parlent pas, ou à de fort rares exceptions près, la langue des pays dans lesquels ils se rendent. L'anglais est certes la langue la plus répandue, mais, comme le dit si bien un espérantiste: «Allez donc demander un renseignement en anglais à un paysan lozérien, ou à un citadin, vous aurez toutes les chances pour qu'il ne comprenne pas. Le développement du progrès, la multiplicité des contacts avec tous les peuples, ainsi l'Europe se construit, mais ainsi que le dit très justement un professeur de La Canourgue, nous restons des voisins, sans relations d'homme à homme. Il y a là un problème difficile, que les Anglais s'efforcent de résoudre, par exemple un tiers des parlementaires britanniques ont constitué dans leur Parlement un groupe pour l'espéranto. Certes l'espéranto se développe, mais il reste une langue trop peu connue, les espérantistes se décourage pas, heureusement ils savent qu'il faut longtemps à une idée pour s'imposer. Alors demain vous êtes conviés à cette conférence sur l'espéranto; elle ne manquera pas d'intérêt. Et si vous désirez des détails complémentaires vous pouvez prendre contact avec M. Jean Hénin, à La Canourgue.

Gérard MENATORY.

Pardonu se ni dediĉas tutan paĝon al la sama temo sed la afero estas pripensinda. Malgraŭ la ĉi-supraj artikoloj en la gazetaro, intervjuo ĉe loka radio stacio, anoncetoj, afiŝoj en la vendejoj.....la entreprenoj fiaskis.

Certe la aŭdaca entrepreninto faris kelkajn erarojn; ekzemple prelego iun lundon ne estas la plej alloga metodo. Eble antaŭ ol lanĉi kurson, oni certigu pri la intereso (okaze de foiro de la asocioj ekzemple) aŭ oni martelu plurfoje, pacienc...

La metodo de "buŝo al orelo" kaj ankaŭ la videbla akcepto de eksterlandaj gastoj estas aliaj efikaj rimedoj.

Estas evidente, ke se ni Esperantistoj ne provas, ne riskas, ne entreprenas....neniam oni aŭdos pri Esperanto...nek ĝin parolos!

UFE decidis varbi per la perkorespondaj kursoj, per anoncetoj en iuj gazetoj (Telarama) kun grandioza unua premio: rondvojaĝo de la mondo... se estos sufiĉe da aliĝoj.


Ĉu iuj konatoj de vi ne interesiĝus ?

3-a Internacia

Kanzon-Teatra Festivalo

PARIZO

23 kaj 24-ajn de novembro 1985




**jam rezervu
la daton**

DISTRA PAĜO

Krucvortoj de R. Raynaud: (R = Radiko)

Horizontale: I: Virnomo aŭ principo de konduto (R). Malvarma vento.
 II. Specio de kristaleca verdeblua smeraldo (R). Interjekcio.
 III. Meze de mamo. Esperantujo ne havas (R). IV. Malrapida hispana danco.
 Inverse: sufikso de pasiva participo. V. Bonazio (R). Monunuo en Irako.
 VI. Du samaj vokaloj. Afero de hazardo (R). VII. Fenomeno, laŭ kiu du
 likvaĵoj intermiksiĝas tra duontralasiva membrano. Rilata al tute
 malklera homo. VIII. De vi. Nomo de neesperanta litero. Nedifinita pronomo.
 IX. Semajntago (R). Ĝi troviĝas kie lumo ekzistas (R). X. Tradicia solena observo de
 ceremonio (R). Plej bona parto el aro (R). Epoko (R). XI. Restaĵo de la korpo de iu
 sankta persono (R). Longa kava cilindroforma ilo (R). XII. Malgajhumora (R). Fiŝreto (R).



Vertikale: 1. Esperanto aŭ ĉeflaboro (R). 2. Komenco de akordo. Du vokaloj. Refleksiva pronomo.
 3. La unua rango de maristo. 4. Elemento apartenanta al la maloftaj teroj, aŭ se vi preferas: ĉefurbo en Israelo. Peceto (R). 5. Inverse: persona pronomo. Interjekcio por esprimi malŝatan senzorgecon. Specio de musteledoj. 6. Kontraŭa. Determini la ĝustan lokon (R). 7. Sudafrika monunuo aŭ "bordo", se vi preferas. Planti junan branĉon (R). 8. Ne broŝurita. Inverse kaj fonetike: religia promeso. 9. Borneo estas ĝia plej granda insulo. 10. Instrumento bazita sur la hidrostatika principo (R). 11. Elmontrejo (R). Malsilento. 12. Scienco. Tia estas gasto, se ĝi longe ne restas (R)

Solvo de la numero 93: Horizontale: I. Kunlaboranto. II. Arierulo. Uat'. III. Rato. Relikvo
 IV. Ig. Pilk'. Zoil'. V. Kavalerio. VI. Anar'. Sarkasm'. VII. Tord'. Knari. VIII. Moruo. Oleo.
 IX. Ruu. Al. Onalp. X. Irma. Ost'. XI. Snufi. Kartel'. XII. Tosto. Uviol'.
 Vertikale: 1. Karikaturist'. 2. Uragano. Urno. 3. Nit'. Varmumus. 4. Leopardo. Aft'. 5. Ar. Il. Ra.
 Io. 6. Burleskulo. 7. Olekrano. Sku'. 8. Rol'. Ira. Otav'. 9. Izokron'. Ri. 10. Nuko. Ailanto.
 11. Tavits'. El'. El'. 12. Otol. Miopul'.

solvo de la enigmo: Proverbo: Malsata stomako orelon ne havas.

ENIGMO: Senvokala proverbo: S. ĉ.. b.l..s .nt.. s.. p.rd.,t..m .n l. t.t. .rb. .st.s
 .n .rd.

(sammaniere vi povas skribi proverbon kun nur la vokaloj)

MAGIAJ LITEROJ KAJ MAGIAJ CIFEROJ

Ekde la 25a de Oktobro 1985, je la 23a horo por telefoni en Francio:

- de provinco al provinco: 8 magiaj ciferoj
ekzemple: 66.32.86.36
- de Parizo al Provinco: 10 magiaj ciferoj
ekzemple: 16.31.41.59.26.
- de provinco al Parizo: 11 magiaj ciferoj
ekzemple: 16.1.45.67.89.12.

por telefoni al eksterlando: 9 magiaj literoj

E.S.P.E.R.A.N.T.O.

(Laŭ ideo de Gap-E°)

Por la venonta numero sendu viajn kontribuojn plej malfrue la 2an de Decembro al J. Hénin. 48500. La Canourgue.